


# BRAZILA ESPERANTISTO

49-A JARO

JULIO-AUGUSTO 1955

N.º 496-497

## MACAÉ



Urbo, kie okazos la 2-a Esperanto-Kunveno de Ŝtato Rio de Janeiro. La bildo montras la marbanlokon Imbetiba, kun apuda trasomera hotelo.

JULIO-AUGUSTO 1955

N.º 496-497

49-a Jaro

**BRAZILA ESPERANTISTO**

(«O Esperantista Brasileiro»)

Oficiala organo de

**BRAZILA ESPERANTO-LIGO**

Societo de publika utileco, laŭ registara dekreto N. 4356, 26

Oktobro 1921

Direktoro :

**A. CAETANO COUTINHO**

Respondeca redaktoro (redactor principal) :

**D-ro CARLOS DOMINGUES**

Administracio kaj Redakcio :

**Praça da República, 54, 1.º**

Telefono: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Senpaga por anoj de B. E. I.

Eksterlande: unu dolaro aŭ 15 respondkuponoj

**QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**

(De acordo com os Estatutos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

Cr\$

Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o «Brazila Esperantisto» ....	40,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista .....	70,00
Membro Assistente: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista «Esperanto» .....	150,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante ....	250,00
Patrono: recebe o mesmo que o Membro Assinante .....	750,00
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante .....	3.000,00

Todas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

**LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO****PRAÇA DA REPUBLICA, 54, 1.º**

Rio de Janeiro, DF.

**LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO****Balancete referente ao ano de 1954****RECEITA**

	Cr\$
Saldo de 1953 .....	1,60
Assinaturas .....	8.795,60
Comissões .....	4.594,50
Congressos .....	1.000,00
Contribuições .....	70.019,00
Cursos .....	15.036,30
Diversas Receitas .....	480,10
Donativos .....	4.000,00
Fundo Montevidéu .....	5.650,00
Livraria .....	95.625,30
Subvenção .....	10.000,00

215.202,40

**DESPESA**

Assinaturas .....	7.015,00
Comissões .....	2.049,00
Cursos .....	2.395,00
Despesas da Sede .....	4.156,80
Diversas Despesas .....	1.176,80
Franquia .....	7.886,40
Fundo Montevidéu .....	5.650,00
Livraria .....	79.623,40
Material de Expediente .....	10.116,30
Propaganda .....	10.518,70
Quotas .....	50.955,00
Revista .....	19.874,00
Serviços de Secretaria .....	13.780,00
Saldo para 1955 .....	12,00

215.262,40

Rio de Janeiro, 3 de Janeiro de 1955.  
— IRANI BAGGI DE ARAÚJO, Tesoureira.



# BRAZILA ESPERANTISTO

49-A JARO

JULIO-AUGUSTO 1955

N.º 496-497

## ASSOCIAÇÕES COLABORADORAS

De acordo com o lema da Universal Esperanto-Asocio — «A União é a Força», o seu Estatuto prevê no âmbito da associação internacional a participação e a colaboração de todas as instituições especializadas que empreguem o Esperanto.

Não é mister acentuar o alto valor de tal colaboração, que não só contribui para a solidariedade do Movimento Esperantista em geral, mas serve para coordenar os esforços individuais de especialistas de todo o mundo e impulsionar a difusão de conhecimentos especiais por meio da organização internacional.

O Anuário do Movimento traz a relação das Associações Colaboradoras, sendo de notar que algumas delas, diferentemente da U.E.A., não inscrevem nos seus Estatutos a neutralidade. Presentemente são as seguintes essas sociedades, mencionadas por ordem alfabética:

A *Internacia Asocio de Poŝmarkkolektantoj* visa principalmente a divulgar o Esperanto entre os filatelistas. Quer mostrar como a Língua Internacional é utilizável no mundo filatélico e quão facilmente o filatelista pode, por meio dela, entrar em contacto com coleccionadores em outros países para enriquecer a sua coleção. Em segundo lugar visa a auxiliar os filatelistas na sua ocupação.

A *Internacia Federacio Esperantista Fervojista* tem por fim estabelecer relações e criar a fraternização dos activos e aposentados, do mundo inteiro, que saibam o Esperanto. Faz propaganda da Língua Internacional no campo de trabalho dos ferroviários e se esforça por fazer penetrar o seu ideal nas instâncias respectivas.

A *Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista* é uma associação internacional de católicos esperantistas. O seu fim é servir pelo Esperanto ao catolicismo e à catolicidade. Esforça-se por atingir esse alvo por meio da propaganda, de ligas nacionais, de um órgão oficial, de inquéritos, congressos e da organização de serviços.

A *Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj* propugna o sentimento de coleguismo internacional em escala mundial, o que possibilitará mais larga cultura pedagógica e difundirá o ensino do Esperanto nas escolas.

A *Internacia Sciencia Asocio Esperantista* propõe-se a aplicar o Esperanto nas esferas científicas e técnicas e a facilitar o seu uso por todos os meios.

A *Kristana Esperantista Ligo Internacia* é uma liga internacional de esperantistas evangélicos de todas as partes do mundo. O seu escopo é duplo: quer criar um contacto eficaz entre cristãos de países e igrejas diversas, e



também difundir entre os esperantistas o Evangelho de Jesus Cristo.

A *Kvakera Esperantista Asocio* destina-se a interessar os membros da Sociedade de Amigos (quacres) pelo Esperanto e a interessar os esperantistas pela Sociedade de Amigos.

A *Skolta Esperantista Ligo* apresenta os seguintes fins: difundir os ideais escoteiros por meio do Esperanto; difundir o Esperanto entre os escoteiros; criar uma literatura escoteira em Esperanto; editar uma revista escoteira internacional; solidificar o sentimento de fraternidade, comum aos dois movimentos, entre os jovens de diferentes nações.

A *Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio* trabalha pela divulgação do Esperanto entre os médicos, os farmacêuticos e os diversos colaboradores dos médicos, e pela sua introdução nos jornais e nos congressos internacionais de Medicina.

A *Universala Ligo* visa não só a propagar a ideia da Federação Mundial com um Governo Mundial, mas também a educar os povos para a cidadania do mundo.

Há ainda o grupo das entidades que dão apoio ao Movimento Esperantista.

O intuito destas breves notas é pedir a atenção dos nossos samideanos para essas respeitáveis associações que colaboram com a nossa organização universal, mas sobretudo salientar o facto de que nem todas elas têm já representantes ou delegados no Brasil.

Fazemos, por isso, um convite aos esperantistas que se interessam pelos temas tratados pelas Associações Colaboradoras, para que entrem em contacto com cada uma delas, de modo que nas

## II CONVENÇÃO FLUMINENSE de ESPERANTO

La II-a Esperanto-Kunveno de Ŝtato Rio de Janeiro estas fiksita por 23-25 de Septembro, en la urbo Macaé, sub la auspicioj de la Esperanto-Klubo de Macaé. La Organiza Komitato fervore agadas por tiu celo, kaj jam organizis la programon:

Vendrede, 23—15 h. Prepara Kunsido en la sidejo de Associação Comercial de Macaé. Baloto de la Estraro de la Kunveno. 17 h. Inaŭguro de la Ekspozicio de Esperantaĵoj (Casa Garcia). 20 h. Solena Malferma Kunsido. Salutoj al la kongresanoj.

Sabate, 24—9 h. Vizito al la Komunumaj Autoritatoj. 10,30 h. Promenado tra la urbo. 14 h. Unua laborkunsido. 20 h. Solena Kunveno ĉe la Esperanto-Klubo de Macaé. 21,30. Balo ĉe salono de Ipiranga F.C.

Dimanĉe, 25—10 h. Inaŭguro de la Strato L.L. Zamenhof. 12 h. Dua laborkunsido. 14 h. Interfratiga Esperantista festeno. 19 h. Solena ferma kunsido. Artfesteto.

Kotizoj: Individuo Cr\$ 100,00. Familiano Cr\$ 50,00. Esperantistaj Asocioj Cr\$ 500,00. Aliaj Institucioj Cr\$ 1.000,00.

---

### HELPU AL LA MOVADO VARBANTE NOVAJN MEMBROJN!

---

próximas edições do Anuário todas apareçam representadas em nosso país.

Caminhamos para uma centena de delegados de U.E.A. no Brasil. Seria de desejar que as colaboradoras da nossa grande associação neutra também aqui estivessem activamente representadas.





# Brazila Kroniko

## CEARÁ

*Fortaleza* — Nia samideanino Guiomar Aquino komencis fari en la gazeto *Correio do Ceará* praktikan kurson de Esperanto, kiun sekvas multaj legantoj Bonan sukceson!

## BAHIA

*Salvador* — La estraro de Bahia Esperanto-Asocio sukcesis aranĝi montran fenestron ĉe la supra parto de la lifto Lacerda, la plej frekventata komunikilo inter la alta kaj la malalta partoj de la ĉefurbo, fronte al la Urbodomo. Tie ĝi preparis Esperantan ekspozicion, de 15 Marto ĝis 16 Aprilo. Ĉiusemajne estis modifita la kolekto da ekspoziciitaj objektoj, tiel elstarante la progreson de nia lingvo:

1.<sup>a</sup> semajno — Ekspozicio de didaktikaj Esperanto-libroj, eldonitaj en pluraj landoj. Sur larĝa rubando oni legis la vortojn: *Esperanto, vivanta lingvo*.

2.<sup>a</sup> semajno — Sub la rubando — *Esperanto kaj gazetaro*, ekspozicio de gazetoj kaj revuoj esperantistaj el ĉiuj partoj de la mondo.

3.<sup>a</sup> semajno — *Omaĝo al la Urbestraro* — Ekspozicio de 105 bildoj prezentantaj 82 urbodomojn el 26 landoj, kolekto ricevita de 34 esperantistoj el la mondo.

4.<sup>a</sup> semajno — *Esperanto kaj turismo* — Granda nombro da prospektoj

ilustritaj kaj priskribaj de vidindaj lokoj kaj afiŝoj artaj, el pluraj landoj, por turisma propagando.

Lastaj tagoj — *Utilo de Esperanto* — Afiŝoj kaj desegnaĵoj pri esperantistaj kongresoj, universalaj kaj landaj, kaj pri la ekspozicio en Montevideo kaj aliaj. Gratulojn al niaj amikoj Jaddo C. Maciel kaj Onias Almeida.

*Ilhéus* — Post balotado, Ilhéus Esperanta Grupo enoficigis sian novan estraron: Prez. Eléus Leonardo de Sá; Vic-Prez. Valdomiro Oliveira Cruz; 1-a. Sek. Antonio Magno Rosa; 2.<sup>a</sup> Sek. Osvaldo Rosa de Sousa; Kas. José Amâncio Rodrigues; Bibl. Valdelice Cruz Oliveira; Prop. dir. João Cardoso Pitombo.

## STATO RIO DE JANEIRO

*Niterói* — Niterói Esperanto-Klubo aklame reelektis por la periodo 1955-56 la saman estraron, kiu direktis ĝiajn laborojn dum la pasinta dujaro 1953-54. La ĝenerala Kunsido aljuĝis bonfarintajn membrojn al la anoj de NEK Albina de Moraes, Edith Wehrs, Mário Ritter Nunes, Octávio Viana Peixoto, Ivan Madeira Coelho, António M. España kaj al s-ro Aldemar Alegria.

*Macaé* — La 21-an de Aprilo enoficigis la estraro de Esperanto-Klubo de Macaé por la periodo 1955-56: Prez. Wanderley da Silva; Sek. Sílvio R. Reis Peixoto; Kas. João Baptista Gomes; Bibl. Osires Pais. Konsilantaro: Orlan-



do Tavares Dias, Jaime Silva, José Bruno de Azevedo, Maria Madalena Gil kaj Carlos A. Albuquerque.

### SÃO PAULO

*São Paulo* — Tri elementaj kursoj estas inaŭguritaj ĉe la Komunuma Biblioteko. Ĵaŭde du, sub la gvido de niaj samideanoj Américo de Andrade kaj Horácio Pereira dos Santos; sabate la tria, kiun gvidas tiu ĉi lasta samideano.

— La grava ĵurnalo *A Gazeta* ĉiusemmane publikigas artikolojn pri Esperanto, verkitajn de nia amiko Horácio Santos.

— Nia samideano F. S. Almada en la ŝatata programo *Granda Parolata ĵurnalo Tupi*, de la Radiostacio Tupi, disradias inviton al la brazilaj infanoj, kun peto pri verkoj por la japana enciklopedio *Infanoj de la Mondo*.

— Interfrata Esperanta Klubo elektis la 27-an de Marto la ĉi-suban estraron por la dujaro 1955-56: Prez. Américo Andrade; Vicprez. Horácio P. dos Santos; 1.<sup>o</sup> Sek. Brumel A. Monteiro; 2.<sup>o</sup> Sek. Cláudia Techic; 1.<sup>o</sup> Kas. Mário Egídio Ghirello; 2.<sup>o</sup> Kas. Apeles Lemos; Prop. Dir. Euclides Vítor; Soc. dir. José Daganzo kaj Felipe Acquavita; Bibl. Orlando kaj Agenor Basílio; Komis. Kontrol. D-ro Arnaldo Viana, Carlos Poledna kaj D-ro Waldir Rocha. En ĝia sidejo funkcias E-kurso.

— Profitante la Unuan Ekspozicion de Spiritistaj Libroj IEK organizis, sub la direkto de nia samideano Cícero Pimentel, Esperantan fakon, konsistantan el Esperantaj verkoj pri spiritismo kaj ankaŭ lernolibroj kaj vortaroj. Al ĉiuj vizitintoj de la Ekspozicio, okazinta de 26 ĝis 30 de Aprilo, oni donacis la broŝureton «*Breve História do Dr.*

*Zamenhof e da Lingua Internacinal Esperanto*».

*São Miguel Paulista* — Esperanta Klubo Zamenhof, en kunsido okazinta la 25-an de Aprilo elektis sian novan estraron por la periodo 1955-57; Prez. Osvaldo Pires de Holanda; Vic-prez. Alvaro Ragaini; Ĝen.-sek. Darmy Mendonça; 1.<sup>o</sup> Sek. Maria de Mesquita Barros; 2.<sup>o</sup> Sek. Edilda Gomes Ferreira; 1.<sup>o</sup> Kas. Oscar Moreira Barros; 2.<sup>o</sup> Kas. Osvaldo R. de Souza; Bibl. Valdemar Cordeiro; Prop.-ĉefo Ananias Ferreira de Oliveira.

### PARANÁ

*Curitiba* — Paraná Esperanto-Asocio daŭre klopodas por konatigi nian lingvon per la gazetaro de la tuta ŝtato. En la gazeto *A Tarde* (La Vespero), nia samideano Newton de Risti tenas fakon pri Esperanto.

### RIO DE JANEIRO (D. F.)

En la 30-a de Aprilo Brazila Klubo Esperanto okazigis specialan kunvenon por festi la 150-an naskiĝan datrevenon de la fama dana rakontisto Hans Christian Andersen. S-ro Amarílio de Carvalho legis la artikolon de S. M. Kristensen, senditan al BEL de Lia Ministra Moŝto de Danujo en Brazilo kaj publikigitan en nia lasta numero; S-ino Clara Alvina Zuhlke Juruena legis la belan fabelon «La novaj vestoj de la reĝo», tradukitan de Zamenhof; kaj S-ro Luís Carlos Nunes D'Angelo legis per brajla preso la lastan ĉapitron de la biografio de Andersen verkitan de Heilskov. Kiel memorigaĵon pri la kunveno S-rino Zuhlke Juruena disdonis interesan karton kun versaĵo de Andersen; tiu karto estis poste dissendita al la brazilaj Es-



## Programo de la III-A Esperantista Eukaristia Mondkunveno en la Kadro de la 36-A Internacia Eukaristia Kongreso

17-24an de Julio 1955, Rio de Janeiro, Brazilo

Julio 17, Dimanĉo:

1) Je la 14.30 horo, en la Salono de la Monaĥejo de Sankta Antono, Largo da Carioca.

INTERKONATIGA KUNSIDO:

Bonvenigaj kaj salutaj paroladoj; disdono de informiloj kaj dokumentoj; aprobo de la programo ktp.

2) Je la 17-a horo:

Nia partopreno en SOLENA PROCESIO, kun Verda Standardo kaj Afiŝoj kun Esperanta Teksto.

Julio 18, Lundo, 19 Mardo, 22 Vendredo kaj 23 Sabato, je la 10-12 horoj, en la Salono de la Monaĥejo de Sta Antono, Largo da Carioca:

KUNSIDOJ de STUDOJ:

1) Referatoj pri la oficiala temaro de la 36-a I.E. Kongreso "Kristo Savinto kaj Lia Eŭkaristia Regno", Esperante farotaj de diverslandaj Pastroj.

2) Paroladoj pri la "Katolika Esperanto-Movado" sub ĝiaj diversaj aspektoj, farotaj de famekonataj kaj spertaj samideanoj.

Julio 21, Jaŭdo, je la 20-a horo, en la salono de la ŝtata Kolegio Pedro II, Rio.

ARTA VESPERO:

1) Deklamado de poemoj de religia sento

2) Folkloraj kaj Religiaj Kantoj

3) Teatraĵo de religia signifo.

Julio 22, Vendredo, je la 20.30 horo, en la Placo de la E. Kongreso:

ESPERANTISTA SALUTO honore al Skta Sakramento, en la Solena Kunsido de la 36-a I. E. Kongreso.

peranto-kluboj. Car D-ro Miguel Timponi, Prezidanto de BEK ne povis ĉesti, prezidis la kunvenon la Prezidanto de BEL, D-ro Carlos Domingues.

Julio 24, Dimanĉo, je la 16-a horo: Partopreno en la SOLENA PROCESIO, kun la Verda Standardo kaj Afiŝoj. Kantante la oficialan Himnon de la Kongreso en Esperanto.

Je la 8-a horo de la mateno de la tagoj 18, 19, 20, 22, 23 kaj 24 de Julio, okazos speciala Meso por la Esperantistoj en la bela kaj famekonata preĝejo de Sankta Antono (Largo da Carioca), kun komunaj preĝoj, kantoj kaj predikoj en Esperanto.

K R O M E, Pilgrimantoj-Esperantistoj partoprenos kompreneble ankaŭ la diversajn solenajn ceremoniojn, ĝeneralajn kunsidojn kaj procesiojn de la Eŭkaristia Kongreso.

EKSKURSOJ: Dum la Kongresa semajno, la partoprenantoj de nia Esperantista Sekcio faros ekskursojn en la urbo aŭ ekster la urbo Rio-de-Janeiro. La aranĝo estos farata, surloke, laŭ la deziroj de la partoprenantoj.

## EDIÇÕES CATÓLICAS

Imitado de Kristo, trad. de Fr. Wigbertus Van Zon L. K.	
Enc. simples	55,00.
De luxo	70,00
Tutmonda Laudo — P. Wanne-makers S J	— Enc. . . . .
	50,00
Nia Mesmistero — W. Roche S.J., tr. J.F. Smeehuijzen	
— Enc. . . . .	40,00
Pregareto — P. Carolfi O. F. M.	10,00
Al Altaro de Dio! — P. Thalmaier . . . . .	10,00
Spiritaj Ekzercadoj — Sankta Ignacio de Loyola . . . . .	25,00
Papo Pio X beata — Halbedl	30,00
O Papa Pio X, Protector dos Esperantistas — Cartões Postais — Duzia . . . . .	25,00
Espero Katolika — Revista mensal — Assinatura anual	50,00

Serviço de Livros de B.E.L.





## LA MISTERO

ROMANO

**Afrânio Peixoto, Coelho Neto,  
Medeiros e Albuquerque,  
Viriato Correia**

XV

### LA INDICOJ

Ĉiuj en la salono estis kaptitaj de la surprizo pro la neatendita krio. F-ino Lucinda stariĝis de la seĝo kun miro en siaj grandaj okuloj. La nazumo de Majoro Melo Bandeira preskaŭ falis.

— Kiu estas tiu viro? ĉiuj demandis per la okuloj.

Lobato stariĝis por fikse rigardi Albergaria de pli proksime kaj poste turnis malantaŭen:

— Xavier, venu ĉi tien!

Kaj post unu momento:

— Ĉu ĉi tiu junulo ne estas tiu sama de la dolĉaĵoj de la maljuna nigrolino?

— Jes, respondis la komisaro.

Albergaria rekonsciiĝis. Li estis konduktinta tute nesingarde, kaj tio povus esti fatala al li. Al kiu utilis la longa studado de la krimo, la antaŭdecido de tiom da jaroj, la priokupateco, ke neniu postsigno restu, se nun pro impulso li ĉion fuŝas per agoj frenezaj kaj kompromitantaj?! Fulmobrilo eklumigis lian kapon. La solvrimedo en la momento estis trankvila sintenado, kaŝema kaj cinika.

— Kion vi venas fari ĉi tie? demandis Lobato arogante.

— Mi venas por defendi ĉi tiun kompatindan junulinon, kiun la Polico intencas enmiksi en krimon pri kiu ŝi ne estas kulpa.

Tiuj paroloj diritaj per tiel konvinka tono ne plaĉis al la aŭtoritatuloj. Melo Bandeira, vidante en ĉio la ekstremon de la fadeno, faris al li intencan demandon:

— Kial vi scias, ke ŝi ne estas kulpa?

Albergaria, kiu jam plene sin regis, ne konfuziĝis.

— Ĉar oni ne bezonas vidkapablon por esti konvinkita, ke tia sinjorino ne

povus plenumi, plani aŭ eĉ pensi krimon teruran.

La policanoj silentis dum momento. La konvinka tono de Albergaria estis funde impresiga.

— Kaj ĉu vi konas ĉi tiun junulinon? demandis Cabral por diri ion.

Inter f-ino Lucinda kaj Albergaria estis nun fortaj ligiloj. Kiam li eniris kriante tiel neatendite, ŝi miris, ĉar ŝi rekonis tuj la junulon, kiu, en la distrikta policejo malfermis al ŝi la pordon por la forkuro. Tiu ago lasis en ŝia koro grandan sulkon. Ŝia deziro estis renkonti lin por esprimi la dankemon plenigantan ŝian animon. Kaj jen li venas nun kun pli grandanima movo kontraŭstarante la leĝon, la frenezecon de la polica ŝerlokismo por aserti skandale, ke ŝi estas senkulpa. Ŝi sendis por li en tiu momento impulson de amikeco kaj karesemo.

— Respondu, ĉu vi konas ĉi tiun sinjorinon? insistis Cabral.

F-ino Lucinda ekrigardis la unuan Helpan Delegiton per siaj belaj malsekaj okuloj.

— Ni estas geamikoj.

Por Albergaria tio estis kvazaŭ limvorto.

— Ĉu vi, kiuj estis tiel spertaj mal-krovi misterojn, ne komprenis tuj, ke nur amikaj rilatoj povus venigi min ĉi tien? Ni estas geamikoj, kompreneble. Se ne estus tial, ĉu mi rajtus esti en ĉi tiu loko?

Ĉio, kio okazis, konfuzis la aŭtoritatulojn. La Polico baraktis en vera labirinto pro la murdo de Sanches Lobo. F-ino Lucinda estis la lasta vojo, kiun ŝi trovis. Se tiu mankus, ĉio estus perdita. En alia okazo la apero de Albergaria kriante la senkulpecon de la filino de la bankiero estus afero tute ordinara kaj ne surprizanta, sed en tiu momento en kiu ĉiuj skuiĝis en kompleta haoso, ĝi alportis profundan konfuzon.

Melo Bandeira konservis iom da trankvileco. Lia longedaŭra sperto pri enketoj avertis lin, ke li ne malzorgu la plej malprecizan indicon kaj ke, se la indicoj ne ekzistas, li penu inventi ilin.



Kaj li demandis:

— Ĉu vi scias iom pri la murdo de Sanches Lobo?

— Mi scias ĉion, respondis Albergaria.

Miro montriĝis sur ĉiuj vizaĝoj. Xavier portis la manon sur la kapon, grante ĝin laŭ sia ordinara gesto; Cabral malfermis sian maltrankvilajn okulojn; Lobato rektiĝis sur la talonoj de siaj elegantaj ŝuoj, kaj la rigardo de Melo Bandeira brilegis tra la vitroj de lia nazumo.

— Ĉu vi scias? demandis la estro de la ŝerlokoj kun emociita ĝojo.

— Mi scias ĉion, kion la ĵurnaloj rakontas, Albergaria finis.

Kia seniluziigo! Albergaria tamen ne lasis al ili la tempon por paroli:

— Kaj se oni deduktas el tio, kion rakontas la ĵurnaloj, la Polico estas malprava.

— Malprava! ekkriis Melo Bandeira ŝokita.

— Malpravega! Kion vi faris ĝis nun? Vi estas perdintaj tempon inventante murdinton. Estus pli bone, se vi uzus la tempon por lin eltrovi. Kaj por eltrovi lin, kio estas necesa? Serĉi la indicojn, sekvi la postsignojn. Koncerne murdon, kiel tiu de la bankiero Sanches Lobo, kie devas esti la indicoj? En la loko mem de la krimo. Ĉu la polico jam iris tien por studi la lokon? Laŭ tio, kion mi legis en la ĵurnaloj, ĝi esploris nur la pozicion de la kadavro kaj de la ĉambro. Eĉ tiu esploro estis nekompleta. Ĉu vi atentis al la fingrostampoj lasitaj sur la mebloj? Ne. En krimo kiel ĉi tiu la krimulo lasas ĉiam siajn postsignojn. Sed nun ne estas plu tempo. Ĉu la polico ekzamenis la indicojn lasitajn en la ĝardeno, sur la ŝtuparo, en la ĉambro mem? Ankaŭ ne. Kiam ĝi informiĝis pri la murdo, ĝi rapidiris en la domon. Kiu sciis, ĉu esplorinte la piedsignojn sur la sablo oni estus facile eltrovinta la krimulon per la dimensio de lia ŝuo? Krimoj jam estis malkaŝitaj nur per tiu detalo. Eĉ ĉi tie jam okazis fakto simila: Rocca estis indikita kiel murdinto de la fratoj Fuoco nur pro tio, ke li lasis sur la lito de la viktimo la premsignon de sia ŝuo. Sed nun ne estas plu tempo.

La intenco de Petro Albergaria estis erarigi la Policon. Li bone sciis, ke per la fingrostampoj la krimo ne povus esti malkaŝita, ĉar li ĝin plenumis kun kotonaĵgantoj. Li sciis ankaŭ ke per la piedsignoj de la murdinto sur la sablo ne estas ebla trovi iun klarigon pro tio, ke li vestis al li la piedojn per tenisaj botoj:

Kaj sin turnante al la aŭtoritatuloj:

— Vi certe pardonos miajn rimarkojn. Ili estas bonaj por nenio. Sed kiu estas ekstere, ofte vidas pli bone ol tiu, kiu estas en la interno.

Por Melo Bandeira la policaĵ aferoj estis kvazaŭ manio. Aŭdante iun paroli kun iom da juĝokapablo pri kriminalaĵaferoj simpatia impulso tiris lin tuj al tiu persono. En tiu momento Albergaria ne estis por li viro kiel la aliaj, sed kolego, teknikisto, persono kapabla klarigi al li estontajn dubojn.

Kaj alproksimigante sian seĝon al Cabral li flustris ion al la Helpa Delegito.

— Verdire estas li, kiu pravas.

Albergaria senĉese paroladis.

Sed pri via intenco impliki ĉi tiun junulinon en la krimo, li diris fingremontrante S-inon Lucinda, mi pensas, ke tiel vi montras nur videblan sendirektecon. Mi aŭdis la klarigon, kiun ŝi donis al mi. Ŝi estis vestita kiel viro, ĉar ŝi iris al maskita balo ĉe amikino. Klarigo tute akceptebla pro tio, ke ni estas preskaŭ en la Karnavalo. Vi miris, ĉar ŝi estis sur la strato tiel vestita en la societo de pluraj junuloj; ankaŭ tion ŝi bone klarigis. La junuloj apartenas al la familio, en kies domo la balo efektiviĝis, kaj ili devis kondukti ŝin al la festo. Mi diras tion ne pro la fakto, ke mi dediĉas grandan simpatian al tiu junulino sed pro la reputacio mem de la Polico. La persisto en tio, ke oni kompromitu ŝin, estas ne nur neintelegenta, sed ankaŭ estas perdo de tempo. Vi miras, ke ŝi forkuris el la policejo post sia aresto. Tio evidente montras ŝian senkulpecon, aŭ pli bone, ŝian purecon. Ĉu ekzistas virino, kiu deziras esti arestita en policejo? Ĉu ekzistas virino, tiel arestita, kiu vidante malfermitan pardonon ne forkuros?

En tiu momento li eksilentis. Subita paleco kovris lian vizaĝon. Li volis diri



## APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

Para comparação com o original, publicado no nosso último número, damos a tradução do belo trecho de Augusto de Lima, também como homenagem ao notável poeta, que sempre apoiou a nossa causa.

### RIDO KAJ LARMO

Augusto de Lima

Ĉiu homo povas plori, kaj nenio estas ja tiel ordinara kiel larMO, kiu esas ia faciligo de ĉoloro, ĉi tiu komuna propraĵo de la animitaj estaĵoj; sed povas ridi nur tiuj estuloj, irantaj sur pli altan ŝtupon.

La larMOj fluas ĉiuj en la estuaron de la morto, ekstrema konsolo, sed ankaŭ la teruraĵo de la malfortaj. La rido, ne! Starante super la kadukiĝo de la organismo, ĝi serene mokas la morton, kiun ĝi rigardas kiel simplan okazaĵon, tute egale ĉu ĝi estas la mistika rido sur la lipoj de kristanaj martiroj, ĉu la stoika rido sur la pala

ion pli, sed la lango estis peza en lia buŝo, tenita de stranga forto. Ĉiuj ekrigardis lin, ne komprenante tiun neatenditan konfuziĝon.

La rigardo de Petro Albergaria estis fiksita sur la murtableto de la ĉambro. Sur la meblo du objektoj vidiĝis: paro da gantoj el kotono kaj la tenisaj botoj, kiujn li uzis por la murdo de Sanches Lobo.

— Kiel, kiamaniere tiuj objektoj troviĝis tie?

Li penis paroli ankoraŭ, sed ne povis. La dirita stranga forto premis al li la gorĝon.

VIRIATO CORREA — Tradukis Y

vizaĝo de tiuj, kredantaj la supervivadon de virto, ĉu la filozofa rido, apenaŭ montriĝanta en la rigardo de tiuj, kiuj konsideras la vivon ia ero de la ĉeno de la surteraj transformiĝoj; ĉar ĝi ja sensentigas ĉian suferon.

Dum la jarcentoj de la plej granda despotismo la rido dividis la reĝan sceptron, tiam, kiam la kortegaj arlekenoj frakasadis la arogantan nobelaron, havante la plej altan privilegion, ne konsentatan eĉ al la kronuloj mem, de la maldiskretaĵoj, kiuj disklaĉas, kaj de la sarkasmoj, kiuj dispulvorigas.

Os nossos leitores darão apreciada colaboração a esta coluna sugerindo-nos trechos seletos para serem nela apresentados.

## PROF. MANUEL FERNÁNDEZ MENÉNDEZ

Vojaĝante sur la ŝipo *Yapeyú* trapasis nian ĉefurbon la eminenta esperantisto Prof. Manuel Fernández Menéndez, Prezidanto de Urugvaja Esperanto-Societo, kiu vizitos Hispanujon kaj ĉeestos la 40-an Universalan Kongreson de Esperanto en Bologna. Lin atendis ĉe la haveno la estraranoj de BEL D-ro Carlos Domingues, S-ro Ismael Gomes Braga kaj F-ino Irani Baggi de Araŭjo. En la societo de tiuj samideanoj li vizitis la sidejon de BEL kaj detale parolis pri la epizodoj dum la UNESKO-Konferenco en Montevideo. Post tagmanĝo li promenis tra la urbo kun S-roj C. Domingues kaj I.G. Braga, kiuj je la 5-a posttagmeze akompanis nian karan amikon al la kajo kun deziro por feliĉa vojaĝo.



## NEKROLOGO

HEITOR BELTRÃO



Granda perdo por Brazilo kaj por la Esperanto-Movado estis la morto, en la 3-a de Junio lasta, de nia kara samideano D-ro Heitor da Nóbrega Beltrão.

Li ĉiam sin mem konsideris ĵurnalistoj kaj efektive estis dum multaj jaroj Direktoro de la Brazila Gazetara Asocio. Sed, krom tio, li distingiĝis kiel verkisto, poeto, oratoro kaj juristo.

La brazila ĉefurbo lin elektis urbokonsilanton kaj poste deputito. En la du postenoj li brile kaj kuraĝe pledis por la justaj interesoj de siaj kuncivitanoj.

## ALSENDO

(La fama soneto de Arvers)

*Félix-Alexis Arvers, n. 1.806,  
m. 1.850, Paris.*

De la koro sekreto, de l' vivo mistero,  
En min amo eterna subite eniĝis.  
Mi silentis! Pri l' vundo ne estas es-  
[pero,  
Kaj ŝi, kiu min vundis, neniam sciigis.

Mi do pasos, ne vidos min ŝia rigardo,  
Je la flanko de ŝi, izolulo mi vivos;  
Ĝis la morto aliros al mi, en la mondo  
Mi nenion petinte, nenion ricevos.

Sed ŝi! Kvankam amema kaj dolĉa  
[kreita  
Ŝi antaŭen trairas, ne aŭdas distrita,  
La murmuron de l' amo sin al ŝi tur-  
[nanta.


Al la devo severa, aliĝas ŝi forte  
Kaj pri tiuj ĉi versoj, ŝi diros, legante:  
«Nu do, kia virino?» — Kaj ŝi ne  
[divenas.

Trad. C. Aymonier

(El *Lingvo Internacia*, Februaro  
1905).

En la Esperanto-Movado li daŭrigis belan tradicion, ĉar lia karmemora patro, Inĝeniero António Carlos de Ar-ruda Beltrão, estis sindona kaj eminenta Pioniro. 17-jara Heitor Beltrão estis kunfondinto de Brazila Klubo Esperanto, kies honora Membro li ankoraŭ estis. Li prezidis plej efike la Organizan





## Recenzo

Mário Ritter Nunes — GRAMÁTICA SINÓPTICA DE ESPERANTO. Edição de Serviço Gráfico do Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística. Rio de Janeiro, 1954. Brochura de 33 p. 18 x 27 cm. Preço Cr\$ 18,00 no Serviço de Livros da B.E.L.

Se existe consagrado mundialmente um quadro sinóptico das palavras correlativas, e toda a gramática do Esperanto é tão regular como aquela parte, por que não reduzir tudo a quadros

semelhantes? Um espírito habituado com sinopses poderia fazer tais quadros, sentiria mesmo necessidade dessa sistematização.

Competente estatístico, o Dr. Mário Ritter Nunes lançou mãos à obra e nos apresenta o seu trabalho nos seguintes quadros: I. Alfabeto-Pronúncia; II. Prefixos; III. Sufixos; IV. Artigo; V. Substantivo; VI. Adjetivo qualificativo; VII. Adjetivos e Pronomes demonstrativos, indefinidos, relativos e interrogativos; VIII. Adjetivos e Pronomes possessivos; IX. Adjetivos numerais; X. Graus de comparação; XI. Acusativo; XII. Quadro das palavras simples; XIII. Verbos; XIV. Particípios; XV. Advérbios e locuções adverbiais; XVI. Preposições; XVII. Conjunções e locuções conjuntivas; XVIII. Interjeições; XIX. Formação de palavras.

O trabalho gráfico era dos mais difíceis e foi executado com maestria: merece todos os louvores, devidos igualmente ao engenhoso plano do Autor. A revisão foi boa.

Em nova edição poderão ser alguns pormenores melhorados pelo Autor, a fim de prestar os serviços que planejou.

Komitaton de la VII Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Rio de Janeiro en 1923. Kiam la Ministerio de Terkulturo, Industrio kaj Komerco en 1926 komisiis al li la redaktadon de la projekto de komerca instruado, li proponis, ke Esperanto estu enmetita en la programon kiel deviga lernobjekto. Por Esperanto li faris multajn elokventajn paroladojn kaj verkis trafajn artikolojn. Kiel nobla politikisto li agadis favore al Esperanto kaj al Brazila Esperanto-Ligo.

*Brazila Esperantisto* sincere kondolencas la familion de nia bonega amiko kaj samideano.



# Bibliografio



**LA INTERNACIA LINGVO** — (*Faktoj pri Esperanto*). Redaktita originale en Esperanto de *D-ro Ivo Lapenna*, Eksprofesoro en la Universitato de Zagreb, Honorifica Direktoro de Centro de Esploro kaj Dokumentado. 1954 — Universala Esperanto-Asocio — Londono. Prezo ..... Cr\$ 100,00.

*Unua parto*: Esperanto kiel solvo de la problemo de internacia lingvo; Formiĝo, ekesto kaj evoluo de E.; Opinioj pri la valoro kaj signifo de E.; Instruado de E.; La Esperanta literaturo; Scienca, fakka kaj popularscienca literaturo; Fakaj vortaroj kaj Terminaroj; Gazetaro; Diversaj formoj de praktika aplikado de E.; Internacia Esperanto-Muzeo en Wien.

*Dua parto*: Esperanto-Organizajoj, iliaj celoj kaj laboro; Organizajoj por praktika utiligo de Esperanto.

*Tria parto*: Universala Esperanto-Asocio: Historio, la nuna organiza formo, kultura agado, praktikaj servoj de UEA, aliaj aktivecoj de UEA por interfratigo de la popoloj; Konkludo; Bibliografio kaj Dokumentoj.

La citaĵo de la enhavo de tiu grava verko, lingve modela, ja sufiĉas por montri ĝian utilon por la Esperantistaro. Kiel diras la aŭtoro, unu el ĝiaj celoj estas "doni en la manojn de la Esperantistaro novan batalilon en formo de taŭge ordigitaj faktoj. Ĉiu persono, kiu laboras sur la kampo de informado kaj klopodas disvastigi la lingvon, povos trovi en la libro abundan materialon".

**FUNDAMENTA KRESTOMATIO** de la lingvo Esperanto de *D-ro L. L. Zamenhof*: 17-a eldono, 446 p. 1954. The Esperanto Publishing Company Limited. Anglujo. Prezo Cr\$ 200,00.

Bele presita per eleganta litertiparo, sur tre bona papero kaj fortike bindita en tolo kun surprisaj oraj kaj verdaj.

La unua eldono de la *Fundamenta Krestomatia* aperis en 1903; preskaŭ ĉiu materialo en la libro estis jam publikigita en la jaroj 1889-1895. Kiam aperis la 5-a eldono, en 1907, *D-ro Zamenhof* diris en la antaŭparolo, ke li trarigardis la *Krestomatian*, kaj trovis diversajn esprimojn, kiujn al li ne plaĉas, kaj kiujn li volonte ŝanĝus. Tamen li tion ĉi ne faris, konviktita, ke por verko, kiu havas la celon subtenadi unuformecon, severa konstanteco estas multe pli grava ol plena perfekteco. Ĉiuj aliaj eldonoj de la 6-a ĝis la 16-a, en 1939, observis la decidon de *D-ro Zamenhof*.

La teksto de la nuna eldono estas nealiigita, sed estas centoj da instruaj notoj kaj klarigoj faritaj de la eminentaj esperantistoj *William Bailey* kaj *W. J. Downes*, *Tial*, kelkaj poezioj, kiuj poste estis modifitaj aŭ reviziitaj de siaj aŭtoroj aŭ tradukintoj, ekz. *La Pluva Tago* (en *El Parnaso de Popoloj*, trad. *Grabowski*) kaj *Kanto*, de *Seleznet* (ŝanĝoj en la teksto kaj la formo, en la revuo *Ĉesky Esperantista*, 1903, paĝo 81), kunservas la primitivan tekston.

**AKUTAGAWA RYONOSUKE** — *La Kapao kaj aliaj Rakontoj*. Trad. el la Japana *Nozima-Yasutarō*. Tokio. Japana Esperanto-Instituto. 96 p. 1954.

Frenezulo hazarde ekloĝas en la lando de la Kapao, fantazia besto amfibia en la japana folkloro. Li observas kaj kritikigas la vivon en la socio de la Kapaoj, kiu spegulas metafore la tiutempan japanan socion". Aliaj rakontoj: *La Nazo*, *Sarĝvagoneto*, *Tu Cuĉun*, fabelo, kiu montras la moralecan karakteron de la verkinto.



## LA VIII ARGENTINA ESPERANTO-KONGRESO

*Luis de Azeredo Coutinho*

(*Daŭrigo*)

Kiel invititoj, partoprenis la estrar-tablon de la Kongreso la jenaj delegitoj: D-ro Luiz de Azeredo Coutinho, de Brazila Esperanto-Ligo; D-ro Carlos Rezende, de "Sociedade Mineira de Esperanto"; kaj S-ro João Masiero, de S. Paulo Esperanto-Klubo. Sidis ĉe la podio ankaŭ la estraranoj de Argentina Esperanto-Ligo kaj la membroj de la Organiza Komitato de la Kongreso.

Komisiita de la Prezidento de la Argentina Esperanto-Ligo, malfermis la kunsidon la senlaca samideano Hugo A. Lingua, sekretario de Informado kaj Interrilatoj de la Organiza Komitato, kiu emocie salutis le ĉeestantojn kaj bonvenigis la fremdajn vizitantojn el Japanujo kaj el Brazilo, kaj kiu prezentis la parolantojn.

En la nomo de Argentina Esperanto-Ligo, parolis Prof-ro Rodolfo Calógero. Li faris ideoriĉan paroladon pri la graveco kaj valoro de Esperanto kaj ĝia progresado en la lastaj jaroj, precipe post la Rezolucio de UNESKO. Altnivela kaj oportuna hispanlingva parolado, ĝi ja estis vera malferma akademia leciono.

Justa kaj daŭra aplaŭdo kronis liajn vortojn. Tuj poste, la Prezidanto donis la parolon al la ĉeestantaj reprezentantoj de la institucioj.

Parolis unue la reprezentanto de Brazila Esperanto-Ligo, D-ro Luiz de Azeredo Coutinho, kiu esprimis la bondezirojn de la brazilaj samideanoj por la brila sukceso de la Kongreso, kaj samtempe salutis la ĉeestantojn.

Sekve parolis la reprezentantoj de "Sociedade Mineira de Esperanto" kaj de S. Paulo Esperanto-Klubo, D-ro Carlos Rezende kaj S-ro João Masiero, ambaŭ brazilaj, kiuj, per kortuŝaj kaj simpatiaj vortoj, dankis al la argentinaj samideanoj la ĝentilan akcepton de ili faritan al la brazila karavano.

Parolis poste la jenaj gesamideanoj: f-ino Margarita Alcantara, nome de "Asso-

ciación Rosarina de Esperanto"; s-ro Pedro Martin, nome de "Clube Rosarino de Esperanto"; s-ro Angelo Corral, el Buenos Aires; s-ro José Marquez, el Eva Perón; Roberto Otermin, el Bahia Blanca; Jorge Abraham, el Venado Tuerto; s-ino Sara Dorin, el Castelar (B.A.); Inĝeniero Luiz Kelety, nome de la montara Zono de Córdoba; kaj s-ro Marcelo Roque, el la urbo Córdoba.

La argentina junularo estis reprezentata de s-ro Hector Soibelzon.

Por fermi per ora ŝlosilo tiun sinsekvon da paroladoj, aŭdiĝis la virinaj voĉoj de s-ino Clara de Hess, argentina, kaj f-ino Lógia Agrícola, brazila.

Oni povas ja konkludi, ke la Esperanta Movado lastjare pligrandiĝis en Argentino. Ĉiuj tieaj societoj senlace laboris, kaj vere efikaj estis iliaj penadoj.

Poste, la sekretario legis diversajn telegramojn kaj salutajn leterojn.

La dua kaj lasta parto de tiu neforgesebla malferma kunsido estis plenumita de la "Coro Mixto Rosario", estrata de Reĝisoro Juan Untersander. Sincere, mi ne scias kiel difini, kion mi sentis dum tiuj artaj momentoj. Ili estis ja miriga elmontro pri la alta kultur-nivelo de la Rosaria junularo, sub la direkto de Prof-ro Untersander. Neforgesebla kultura kaj arta punkto! Ekstere, la pluvo daŭris plu, sed ĝi ne sukcesis ĝeni tiel belan feston... Nia ĝojo estis ankoraŭ pligrandigita de tio, ke la aliaj brazilaj gesamideanoj sukcesis vojaĝi al Rosario, per trajno, kaj ni renkontiĝis en tiu kunsido.

### INTERKONATIĜA VESPERO

En kafejo ni kuniĝis, por la interkonatiĝa vespero, de la dudeka ĝis malfrue en la nokto. Brilaj kaj entuziasmaj estis tiuj horoj, dum kiuj ĉiuj kongresanoj kunfratiĝis. Ĉiuj flue parolis, kantis, ŝercis, kun tiu fido, kiun ni bezonas por antaŭenigi nian lingvon. Ni rimarkis, ke la lernantoj klopodis por sekvi nin en nia interparolado. Ili sentis sin videble feliĉaj ĉe la konstato, ke la belsona Es-



peranto estas ja viva lingvo, facile parolata.

### UNUA LABORKUNSIDO

La 8-an de Aprilo, je la naŭa matene, okazis la unua laborkunsido, ĉe la sidejo de la Astronomia Observatorio, en strato Sarmiento 910. Dum tiu kunsido kuniĝis la komisiono, kiu, el la ĉeestantaj delegitoj, elektis la estraron de la Kongreso. Estis elektitaj: Prezidanto, Prof-ro Jorge de Hess; 1.<sup>o</sup> Vicprezidanto, s-ro Petro Martin; 2.<sup>o</sup> Vicprezidanto, s-ro Hugo Lingua; Sekretarioj, s-roj Kurt Milkshutz kaj Rodolfo Calógero.

Sekve, la sekretarioj de la Ligo informis pri la laboro farita dum la lasta periodo.

Vespere, daŭrige, oni elektis la jenajn komisionojn: por edukado, por informado kaj por la redaktado de la oficiala organo de la asocio patronanta la Kongreson, kiuj prilaboros la ordigitajn temojn.

Post la kunsido oni vizitis la redakciojn de kelkaj ĵurnaloj kaj radiostacioj. Ĉie ni estis bonvenaj, kaj entuziasman akcepton oni faris al la kongresanoj.

Je la 21-a efektiviĝis la "Viva Gazeto", en kiu partoprenis argentinaj delegitoj kaj brazilaj vizitantoj.

Antaŭe, ni havis le plezuron ĉeesti la prezentadon de la juna prestidigitatoro Horacio Regueiro, kiu, kavankam ankoraŭ juna, jam vere bone posedas la lingvon. Nian gratulon, Horacio. Antaŭen!

Jen la temoj de la "Viva Gazeto":

S-ro Pedro Martin — "Arto kaj Sciencoj en la Homaj Rilatoj";

S-ro Luiz Kelety — "Rotario kaj Esperanto";

S-ro Alberto Vigliani — "La Kaŭĉuka Industrio";

S-ro Jorge Abraham — "La Araba Poezio";

S-ro Héctor Palacios — "Vojaĝo tra Brazilo";

D-ro Marcelo Roqué — "Vojaĝo tra Usono";

D-ro Luiz de Azevedo Coutinho — "Demando al la Ĉeestantoj".

La parolantoj kaptis la atenton de la ĉeestantoj. Al ni, brazilanoj, speciale kortuŝis la simpatia kaj delikata informado pri la nacia karaktero de nia internlandano. Fakte, s-ro Palacios akcentis la bonvolemon, la helpemon, la sindonemon de la brazila gento, antaŭ la bezono, la peto de kia ajn proksimulo, petanta aŭ bezonanta helpon.

(*Finiĝo en la proksima numero*)

## INFANOJ DE LA MONDO

A antiga e importante editôra japonesa Heibonsha Limited Publishing (n.<sup>o</sup> 4 Yonbantyo, Tiyodaku, Tokio, Japão) tem em preparo grandiosa obra intitulada *Infanoj de la Mondo* (Crianças do Mundo), em língua japonesa.

Constará de 15 volumes, de 300 páginas cada um, de formato 15x21cm, encadernação forte.

O primeiro volume trata do mundo, em geral; e os outros, dos diversos países e regiões do globo. Um dêles tratará dos países do café e do açúcar, estando o Brasil, Cuba e países da América Latina nele compreendido.

A editôra solicita, com empenho, a colaboração das crianças de todo o mundo, dando impressões sôbre sua vida, sua família, etc., em português e preferivelmente com a tradução em Esperanto, assim como desenhos ou gravuras, sôbre os mesmos temas. Após a terminação da edição japonesa, cuidarà a editôra da publicação da obra em Esperanto e em outras línguas.

### Vocabolario Italiano-Esperanto

Esperanto-Italiano — Grazzini — Prima Parte — Enc. 45,00  
Dizionario Esperanto-Italiano  
Grazzini — Br. . . . . 20,00

Serviço de Livros de B.E.L.



## MEMBROS GRADUADOS DE BEL-UEA

Em continuação à lista publicada no número 490-491 damos abaixo os nomes dos samideanos que no corrente ano tomam parte do movimento esperantista como sócios de categoria graduada:

### PATRONO 1955

Sr. F. S. Almada, São Paulo.

### MEMBROS MANTENEDORES 1955

Dr. Modesto B. de Abreu, Rio Pardo, RS.  
Prof. Jaime F. de Albuquerque, Piraçununga, SP.

Sr. Carlos Olímpio de A. Alves, Salvador.  
Sr. Franklin Assis, Palmeira das Missões, RS.

Sr. Paulo Domingues de Assis, Campinas, SP.

Sr. S. Augusto, GEAWS, Manaus.  
Sr. José Ávila, Pindamonhangaba, SP.

Sr. Othon B. Baena, Rio de Janeiro.  
Sr. Tito de Barros Júnior, Santos, SP.  
D. Iná Borges Beleza, Belo Horizonte.

Pe. Antônio Borges, Fortaleza.  
Sr. Petrónio R. Burger, Lajes, SC.

Sr. Romeu Câmara, Olinda, PE.  
Sr. Alvaro C. Carvalho, ABE, Salvador.

Sr. Júlio Castanheira, Bom Sucesso, MG.  
Sr. Adão Cavalcanti, Vitória de Santo Antão, PE.

Dr. Thomas E. Downey, BKE, Rio de Janeiro.

Prof. Benedito F. Farias, Cachoeira, BA.  
Sr. Manuel Domingues de Sá Fortes, Perdões, MG.

Dr. Hugo Fóscolo, Pompéu, MG.

Sr. A. Wantuil de Freitas, BKE, Rio de Janeiro.

Sr. Jorge Manuel Gaio, BKE, Rio de Janeiro.

Cap. Godofredo de Araújo Góis, Juiz de Fora, MG.

Sr. Ricardo L. Gouveia, Rio de Janeiro.  
D. Clara Alvina Zuhlke Juruena, BKE, Rio de Janeiro.

Sr. Leopoldo H. Knoedt, ABE, Salvador.  
Dr. Sílvio Nunes Leal, Resplendor, MG.  
Sr. Gilbert René Ledon, ESP, Pelotas, RS.

Sr. Antônio Leonardo Sobrinho, Rio de Janeiro.

Sr. João Custódio Machado, Tupaciguara, MG.

Sr. Valdemar Marczinski, São Paulo.

Sr. João Olívio de Melo, BKE, Rio de Janeiro.

Major Geraldo A. Gomes de Pádua, BKE, Rio de Janeiro.

Sr. Octávio Viana Peixoto, NEK, Niterói.

Sr. Manuel Mendes de Queirós, CES, Santos, SP.

Sr. Belisário Ramos Neto, Lajes, SC.

Sr. José de Freitas Ramos, Ribeirão Preto, SP.

Prof. Pedro Real, União da Vitória, PR.

Sr. Reinaldo Reuben, Belo Horizonte.

Sr. Angelo Sampaio, Belo Horizonte.

Sr. Paulino Santiago, Maceió.

Sr. Horácio Pereira dos Santos, IEK, São Paulo.

Sr. Ludwig M. dos Santos, BKE, Rio de Janeiro.

Sr. Manuel Borges dos Santos, Muritiba, BA.

Dr. João Correia Severo, ERB, Bajé, RS.

Gal. Alfredo Lemos da Silva, Rio de Janeiro.

Sr. Fernando Airton Lopes de Sousa, VSEG, Baturité, CE.

Sr. Alcides Tálamo, São Paulo.

Dr. Luís Sérgio Tomás, São Paulo.

Sr. Herberto Urbat, Vila Bela, MT.

Sr. Edgar Vieira, Pindamonhangaba, SP.

Sr. Moacir Vitale, Salto, SP.

No ano passado inscrevemos 72 membros na categoria de Mantenedores, colocando-nos em segundo lugar, depois da Grã-Bretanha. Este ano já inscrevemos 115. Iremos bater um novo recorde nesta categoria? Recordemo-nos de que em 1951 e em 1952 obtivemos duas vitórias consecutivas no Concurso Internacional, facto este até então não registrado com outro país. E desde 1952 somos o país que inscreve maior número de membros em UEA.

Como Patronos já foram inscritos este ano no Brasil tantos membros quantos no ano passado na Grã-Bretanha, que foi o país que apresentou maior inscrição também nesta categoria.